

REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta

NUMERO 7

1923

MAJO

LA ĵus okazinta apero de la romano „Idoj de Orfeo“, kiun nia ĉefredaktoro detale recenzis en ET n-o 134, direktis la atenton de la Esperantistaro je samide-

ano, kiu jam ofte ekprenis la plumon por verki en Esperanto, sed kiu ĝis nun ankoraŭ ne estas ĝenerale konata: s-o H. J. Bulthuis, L. K.-ano en Haag (Nederlando). Dezirante doni al niaj legantoj detalojn pri la persono kaj vivo de la ŝatata samideano kaj per tio veki pli vastan intereson por lia ĵus aperinta rimarkinda verko, ni petis s-on Bulthuis sendi al ni siajn foton kaj biografion, kion li afable plenumis. Jen lia respondo al nia ĉefredaktoro:

Estimata Sinjoro!

Vi petas miajn foton kaj biografion por aperigi ilin en la „Revuo“ de ET.

Volonte mi plenumas vian deziron; tamen — se la biografio estos tro longa (mi estas preskaŭ 58-jara viro) kaj, krom tio, enuigos la legantojn, mi ne estos kulpa, ĉar biografio ne estas romano kun fantaziaj aventuroj, sed en tiu ĉi okazo nur fidela vivopriskribo de ordinara persono. Eble la mia povas esti iom interesa el vidpunkto de internaciaj lingvoj; al kiuj mi dediĉis min jam pli ol kvardek jarojn.

Mi do komencas... ĉe la komenco:

Mi naskiĝis en 1865-a en la vilaĝo Warfum (provinco Groningen en Nederlando) kaj, ĉar en mia juneco mi ĉiam montris malamon al man-

laboro, miaj gepatroj decidis, ke mi iom studados, Malfeliĉe miaj unuaj instruistoj estis malzorgemaj, tiel ke mi post la eliro el la publika lernejo nur kun peno povis fari mian ekzamenon por la tiel nomata „Alta Burĝa Lernejo“ (1878), speco de liceo, en mia naskiĝa vilaĝo.



H. J. Bulthuis, L. K.
aŭtoro de „Idoj de Orfeo“.

Post kvar jaroj, dum kiuj mi plej multe dediĉis min al la studado de lingvoj kaj literaturo, mi akiris la elirdiplomon. Tiu pruvo de kapableco tamen ne estas grandvalora, ĉar ĝia posedanto estis netaŭga por multaj metioj, kaj li ne lernis sufiĉe multe por akiri oficon, per kiu li povus perlabori sian ĉiutagan pannon. Kion mi devis fari? — Kelkan tempon mi pasigis serĉante oficon, sed trovante neniun konvenan, mi fine fariĝis subskribisto ĉe enpezestro de depagoj en apuda vilaĝo, kie mia salajro estis *nihil*, sed kie mi povis lerni la administracion por poste trovi pli bonan oficon. Post unu jaro, en 1886, mi fariĝis skribisto ĉe alia enpezestro en Sas van Gent, apud la belga landlimo en la provinco Zeeland. Tie mia monata salajro estis 20 hollandaj guldenoj, por kiuj mi devis skribadi, kopiadi, kalkuladi de la mateno ĝis la vespero; tamen ĉar mia monata gastoprezado estis 24 tiaj guldenoj, miaj gepatroj

devis sendi al mi ĉiumonate kelkan monon, por ke mi ne dronu en ŝuldoj. Mi estis tamen ĉiam kontenta kaj feliĉa, kvankam estas klare, ke mi ne povis eliri por amuzi min dum la vesperaj liberaj horoj. Sed mi devis iel pasigi ilin, kaj tion mi faris riparante miajn eluzitajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn kaj studante literaturon kaj — *V o l a p ŭ k*, kies ano mi estis jam de la jaro 1883. — Post du jaroj mia salajro plialtiĝis; tiam mi ricevis ĉiumonate 34 guldenojn. Restis al mi 10 por pagi mian lavistinon; por aĉeti vestojn, ŝuojn — kaj kelkfoje libreton. Ĉiu komprenas, ke mi ne fariĝis kapi-

talisto kaj neniam povus fariĝi tia, ĉar en tiu tempo skribisto kun monata salajro de 40 guldenoj estis jam vera fenomeno —, kaj kiu fariĝas fenomeno en sia vivo? Ĝis mia 24-a jaro mi estis skribisto kaj tiam estiĝis doganisto, kaj doganisto (= akcizisto) mi estas ankoraŭ nun.

Mi ne tedos vin priskribante mian doganistan karieron, ĉar ĝi estas iom unutona. Nur tri jarojn mi deĵoris kiel landlima doganisto en la provinco Limburg, kaj dum tiu tempo mi pasigis multajn noktojn sur la kampoj, en arbaretoj aŭ sur la erikejo por kapti kontrabandistojn!! Multajn vintrajn noktojn, sidante-kuŝante en mia „ŝafo-felsako“, kiu protektis min kontraŭ la severa tempo (en temperaturo de 10 ĝis 20 Celsius-gradoj sub nulo), mi travivis tiel, pensante pri mia literaturo kaj pri Volapük, kiu tiutempe atingis sian plej altan gradon de fameco. Tiel sidante-kuŝante, mi estis ofte kovrata preskaŭ tute de la falanta

neĝo, tiel ke nur mia kapo kun preskaŭ frostiĝintaj oreloj kaj nazopinto elstaris el la dika neĝtavolo. En tiaj ĉirkonstancoj mi tute ne atentis la kompatindajn krimulojn (!?), kiuj kun pezaj salsakoj sur la ŝultroj preterŝteliris por direkti sin al la holanda landlimo. Tiuj portistoj ordinare marŝis pli ol du horojn tra la falinta neĝo kun 25 kilogramoj da salo sur la dorso, perlaborante per tio tro malmulte por vivi kaj tro multe por morti pro malsato. Ho, la kompatindaj diabloj!... kiel mi en mia „sako“ malenviis ilian sorton! Ĉu vi povas kulpigi min pro tio, ke mi deturnadis mian kapon por ne vidi ilin?

Ĉar mia ofico neniam prezentas poezion, kiun mi tamen tiel amas mi serĉis ĝin alikoke. En miaj liberaj horoj mi daŭrigadis mian studon, lernante krom la kutimaj ankaŭ la hispanan kaj la skandinavajn lingvojn por ĝuadi la literaturon en multaj lingvoj. Kelkfoje mi tradukis poemetojn en Volapük. Mi aldonas ĉi sekvante unu el tiaj versetoj.

Son chapeau.

Au coin de son petit chapeau,
Parmi les fleurs et les dentelles,
Brille un joli petit oiseau.
Un oiseau-mouche aux fines ailes.

Il voudrait, — le ciel est si beau, —
S'envoler où l'azur l'appelle;
C'est en vain: il a pour tombeau
Les cheveux de ma chère belle.

Pauvre oiselet, le coeur percé,
Une épingle le tient fixé
Par une invisible morsure.

Je suis son captif aussi, moi:
Elle m'a piqué comme toi
D'une flèche légère et sûre.

Jules Lemaitre.

De la landlimo mi iris al Hoek van Holland, vilaĝo apud la norda maro en la provinco Zuid-Holland, kie mi konatiĝis kun la Volapük-traduko de „Sonorilkanto“ (de Schiller), vere lerta laŭritma kaj laŭrima traduko, kiu tamen nun estas sen valoro pro la falo de Volapük. Tie mi legis inter aliaj Volapük-verkoj: „Lefü dänatäv fa Klo-naleson Rudolf de Löstän-Nügän“ fa Dr. Siegfried Lederer (Voyage en Orient du prince impérial Rudolf d'Autriche-Hongrie, traduit du Dr. S. Lederer), tre bela 160-paĝa libro kun antaŭparolo en 22 lingvoj. Plie: „Magabuk nen mags“ (Bildolibro sen bildoj) de Andersen. Lederer, kiu fariĝis poste Esperantisto, tradukis la lastan verketon en Esperanton (1909).

Post unu jaro mi iris al Gouda, kie mi en la jaro 1897 la unuan fojon ekaŭdis pri la Zamenhofa lingvo. Tuj mi dediĉis min al ĝi kaj baldaŭ forgesis pri Volapük, kvankam mi ĉiam estis tre fervora Volapükisto kaj de post la jaro 1899 eĉ diplomita „Löpitidel Volapüka“ (sub numero 619). La belan diplomon kun la subskribo de l' estiminda Schleyer mi ĉiam gardos en me-

Ofa 'ät. *)

Len flan 'äta smalik ofa,
Bevü satin e smafloils,
Nidom bödil vemo jönik
Ko lefeiniks flitadils.

Me logs oma logom ko tlep;
Äflitomöv in klil sila,
Ab vanliko — labom plo sep
Kapadeki ji — blönika.

Bödil pöfik, lad padägöl,
Lejekito us pakipöl
Al 'äti da vun nelogik!

Äs bödi, obi efanof
Lejekiko i espinof
Obi me sagit zeladik!

H. J. Bulthuis (1890).

*) ' = h.

moro al tiu ŝatinda viro kaj en memoro al la nun malaperinta lingvo, kiun mi pro la „ideo“ tre ŝatis, kvankam mi neniam povis admiri ĝin, ĉar belsona ĝi tute ne estis laŭ mia opinio.

Kiam kvar jarojn poste mi estis ofice delokata al Haag, mi estis tie la sola Esperantisto, ĉar neniu okupis sin pri Esperanto. Ne estante kapabla, pro mia malforta voĉo, paroladi antaŭ la publiko por tiel fari propagandon por nia lingvo, mi invitis sinjoron Uitterdyk (ankoraŭ Lingva Komitato) organizi Esp. paroladon en ĉi tiu urbo. Li konsentis, kaj de post tiu tempo Esperanto iom post iom disvastiĝis en Haag. Lernolibroj tamen estis tre malmultaj; tial mi verkis kelkajn, luprenis urban lernejon por gvidi kurson kaj laboris nur por Esperanto. Multajn malagrablaĵojn mi devis sperti kaj kontraŭbatali. La eldonistoj, al kiuj mi estis vendinta la manuskriptojn, nur tre malmulte pagis al mi. Idistoj kaj mokantoj poste atakis min. Mia edzino multfoje prave malbon-humoriĝis aŭ ekkoleretis, ĉar mi iomete malzorgis ŝin, kaj tion ŝi ja ne meritis, ĉar mia edzino estas al mi vera trezoro,

Malgraŭ ĉiaj kontraŭaĵoj mi persistadis — ne pro mongaino, sed nur pro la prospero de nia lingvo, kiun mi ĉiam amis el tuta mia koro.

Mi partoprenis literaturajn konkursojn de la „Revuo“, ricevis menciojn, kaj unu el miaj premiitaj verkoj trovis modestan lokon en „Laŭroj“. Mi estiĝis L. K.-ano, tradukis dramojn, el kiuj ĝis nun aperis „Salome“ (1910) de Oskar Wilde, Tiun dramon tre malŝatis kaj eĉ publike malbenis katolika nederlanda pastro pro malĉasta enhavo. Longe kaj atente mi serĉis tiun malĉastan econ, sed ĝis nun ne sukcesis trovi ĝin. Kiam en 1917 aperis legolibreto kun interparoladoj kaj legaĵo, mi sendis ĝin al kritikistoj. Kelkaj laŭdis ĝin, sed tiu de „Esperanto“ (5. septembro — 5. oktobro 1917, jarkolekto XIV, n-o 205/6) trovis multajn erarojn en la legaĵo. Ho, se li estus sciinta! Tiu legaĵo: „La Naitingalo“ estis fidela kopiaĵo de l' traduko de nia Majstro mem, kaj kiun mi estis preninta el la dua jarkolekto de la „Revuo“. La lerta kritikisto verŝajne neniam legis tiun jarkolekton, kaj eĉ ne rimarkis en la bela traduko la stilon de Zamenhof! Oni ankoraŭfoje lernas el tio, ke la ovo ofte volas esti pli saĝa ol la kokino kaj ke ne ĉiu estas kuiristo, kiu portas longan tranĉilon!

En 1921 mi tradukis la faman dekaktan dramon „Imperiestro kaj Galileano“ de H. Ibsen. Ĉu ĝi aperos? Delegito en Kopenhago korespondis kun la filo de Ibsen loĝanta en Roma pri la permeso eventuale eldoni la tradukitan dramon kaj akiris la permeson. Gyldendal, la eldonisto de ĉiuj verkoj de la fama norvega aŭtoro, konsentas entrepreni la eldonon de la Esperantigita dramo, sed kondiĉe ke mi havu garantianton, kiu volas esti respondebla pri la sumo de ses mil norvegaj kronoj!!

Vi vidas, ke mi paciencie persistas, ĉiam kuirante miajn pizojn, same kiel la ĝoja esperplena monaĥo, pri kiu vi povas legi en la antaŭparolo de la romano, kiun vi ĵus ricevis.

Kara sinjoro! Vi nun legis skizon de mia ĝisnuna vivo kaj de miaj travivaĵoj je Esperanto, kaj eble vi demandos, kiel malriĉa doganisto kun familio kaj malgranda salairo kapablas aperiĝi du mil dikajn librojn, kiuj kostas tiom da mono. Kiam mi komencis verki, mi faris tion por agrable pasigi mian liberan tempon, antaŭvidante, ke neniam mi estus sufiĉe monhava por entrepreni mem la eldonon. Mi tamen verkis..., kopiis la manuskriptojn kaj fine prezentis ĝin al la Literatura Asocio. Kun batanta koro mi forsendis miajn „Idojn“ ol s-ino Hankel, kaj per tremetantoj manoj mi post kelka tempo malfermis la leteron kun la kritikrespondo de s-o J. Schenkel, la kontrolinto de la ĵus nomita Asocio. La respondo estis favora, kaj li konsilis al mi eldoni mian romanon.

Jen mi estis refoje en granda embaraso. Eldoniston mi ne povis trovi..., mi eĉ vane atendis iliajn respondojn al miaj petoj, kaj kiel mi mem eldonus ĝin? Mi sciis, ke nenio povas esti entreprenata sen mono, kaj mi ne nur ne estis kapitalisto, kiel mi jam skribis, sed nur senmona dogan-

isto! Okaze en tiu momento aperis neatendite Meceno, kiu ekaŭdis pri mia situacio. Li helpis... kaj miaj „Idoj“ povis aperi.

Kun estimo kaj koraj salutoj
tute via

H. J. Bulthuis

Verkoj kaj verketoj de H. J. Bulthuis.

- 1905 **Neniam estas pli bone ol malfrue.** Komedieto el la angla lingvo, en kunlaboro de L. Touchebeuf. Aperis en Literatura Aldono de „Lingvo Internacia“.
- 1907 **Du biletoj.** Teatraĵeto de Florian, en kunlaboro de L. Touchebeuf. Aperis en Lit. Ald. de „L. I.“.
- 1908 **La onklino el Ameriko.** Premiita originala komedieto („Laŭroj“).
- 1908 **Eenvoudig Leerboek** = lernolibro kun la ekzercoj de Zamenhof. (2-a eldono aperis en 1912, kune 6000 ekzempleroj).
- 1909 **Het Esperanto op School** = lernolibroj por lernejoj. (2000 ekz.)
- 1909 **Krestomatlo.** Granda legolibro kun klarigaj notoj. (2000 ekz.)
- 1909 **La du ŝipoj.** Originala poemo, premiita en Barcelona.
- 1910 **Mia unua legolibro** = legolibro kun klarigaj notoj, por komencantoj. (2000 ekz.)
- 1910 **Salome.** Dramo de Oskar Wilde, tradukita el la angla lingvo. Nun aĉetebla ĉe Esperantista Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris. (2000 ekz.)
- 1911 **De Voorlooper** = lernolibro por infanoj kaj kun bildoj. (2000 ekz.)
- 1912 **La Veziro de Lenkoram.** Turka teatraĵo, tradukita el la germana lingvo. (En manuskripto.)
- 1913 **Pakaĵo por sinjorinoj.** Teatraĵo de Van Maurik, tradukita el la nederlanda lingvo. (En manuskripto.)
- 1917 **Esperanto in het Dagelijksch Verkeer.** Gramatiko, legaĵoj kaj interparoladoj. (2000 ekz.)
- 1920 **Gvidlibro de Hago.** Ilustrita, eldonita okaze de la 12-a Kongreso.
- 1921 **Taglibro de Vilaĝ-pedelo,** de S. S. Blicher, tradukita el la dana lingvo kaj rekomendita de E. L. A. Eldono de Butin & Jung 1922.
- 1922 **Jozefa,** novelo de S. S. Blicher, tradukita el la dana lingvo. Aperis en ET n-oj 124-125.
- 1922 **Imperiestro kaj Galileano.** Dekakta historia dramo de H. Ibsen, tradukita el la norvega lingvo. (Manuskripto.)
- 1922 **Malriĉa en spirito.** Originala triakta dramo Aperas en ET n-oj 134 kaj sekvantaj.

Trans tiuj du aluditaj terpecoj sin etendis griza, tre longa strio, kies finiĝon mi neniam povis vidi, ĉar ambaŭflanke ĝi perdiĝis aŭ kunfandiĝis kun la maro kaj la ĉielo. Super tiu senfina strio, kiun mia patro nomis „la digo“, altiĝis sur tri lokoj malproksimaj unu de la alia supra parto de tri turoj. Kvankam mi en la vesperoj neniam vidis lumon en ili, mi opiniis, ke ili devas esti „lumturoj“ por servi kiel signoj al maristoj. Mia patro diris tamen, ke tiuj konstruaĵoj utilas nur al vilaĝanoj por vidi kioma horo estas kaj por pendigi en ili grandajn sonorilojn, kiuj ĉiam sonoradis, kiam homoj estis enterigataj aŭ kiam komenciĝis la diservoj. Ĉion tion mi komprenis nur malbone, sed la klarigoj kontentigis min.

Neniam mi vidis „vilaĝojn“, ĉar, kvankam mi estis jam altkreska, forta knabo (eble dekjara, sed tion mi ne sciis), mia patro ne permesis al mi forlasi la Insulon por akompani lin al „la Vilaĝo“, kiam li iris tien por aĉeti manĝaĵojn kaj aliajn necesaĵojn, kiujn ne liveris „la Insulo“. Unu fojon mi petis akompani lin, sed ĉar li respondis per nur la unu vorto „neeble“, mi jam neniam ripetis la peton. La rifuzo eĉ ne ĉagrenis min, ĉar estis multaj aliaj aferoj, kiujn mi ankaŭ vane deziris, ekzemple viziti la lunon, kiu vespere tiel mirinde povis lumi, aŭ la super mi starantaj stelojn, kiuj lumis ankoraŭ pli brile. Sed, ĉar viziti tiujn ĉielajn lokojn ankaŭ estis neeble, mi tuj rezignis, kiam mia patro certigis al mi, ke estas neeble viziti „la Vilaĝon“.

La ĉielo sin etendis nun kiĉl hela kloŝo sur ĉio, kion mi povis vidi. Ĉio kuŝis tie trankvile kaj senmove en la bela maro, kaj la solaj estaĵoj, rigardantaj kun mi tiun belan panoramon, estis la ĉiuloke ŝvebpendantaj mevoj. Mi pensis al la multaj ovoj, demetitaj de ili en la sablo, kiujn mi preskaŭ ĉiutage en ĉi tiu monato devis serĉkolekti. Ho, mi ne amis tiujn birdojn, ĉar ili multfoje bekatakis min, kiam mi forprenis iliajn ovojn. Ili estis la solaj por mi ekzistantaj malamikoj. Mi tamen ne staris nun sur la ŝtuparo kun mia kapo ekster la tegmento, por rigardi la mevojn, ĉar mi vidis ilin en ĉiuj horoj de la tago. Mi staris tie por vidi, ĉu la

patro jam revenas de „la Vilaĝo“. Sed vane mi rigardadis sudorienten, kie lia boato laŭkutime ekaperis du tagojn post kiam li forlasis la Insulon. La boato ankoraŭ ne estis videbla, kiom ajn mi streĉis la okulojn, kaj, tedate pro la longa observado, mi malrapide forlasis la aper-turon kaj lasis min gliti laŭ la ŝtuparo.

El la II-a parto, 1-a ĉapitro.

Kvankam Rika ne havas horloĝon, ŝi neniam venis tro malfrue en la farmejon. Ŝi mem estas kvazaŭ horloĝo, ĉion farante aŭtomate. Aŭtomate ŝi vekigaŝ ĉiam la saman horon en la mateno kaj aŭtomate ŝi ĉiam alvenas ĉe sia laboro, precize la sesan horon. Dek minutojn antaŭ la sesa, ŝi ĉiam eliras el sia dometo, kies solan pordon ŝi fermas nur rigle, ĉar ŝtelistoj neniam forprenis ion. Ŝi ŝlosas ordinare nur unu el la ŝrankoj, en kiu ŝi gardas kelkan monon, perlaboritan dum la jaroj post kiam mortis la patro kaj de kiam ŝi laboris en la farmejo.

Kiam ŝi laŭiras la sablan vojeton al la farmejo, ŝia korpo aspektas kiel du blue pentritaj abelujoj, unu sur la alia. Sub la malsupra aŭtomate movigaŝ la piedoj, kiujn ĉiam kovras pezaj lignoŝuoj; ĉar lignoŝuojn ŝi portas vintre kaj somere. Sur la supra „abelujo“ staras blanka kufo. Aŭtomate tiu stranga figuro de la mutulino iras antaŭen. Rika ne rigardas dekstren, nek maldekstren, nek posten, sed ĉiam antaŭen, kvazaŭ nur rekte antaŭ ŝi estus la celo, kiun ŝi neniam devas perdi el la okuloj.

Kiam ŝin renkontas sur la vojo konato, ŝi aŭtomate kapklinas unu fojon, sed tre rapide por kiel eble plej baldaŭ repreni la antaŭan teniĝon.

Rika ridetas nur malofte, sed kiam ŝi ridetas, ŝi montras du vicojn de dentoj, pli blankaj ol perloj.

Ŝia vizaĝo estas bruniĝinta de la suno. En la vilaĝoj oni diras, ke ŝi estas beleta fraŭlino, kaj, rigardante ŝin en la vizaĝon, oni ne povas ne rimarki la bluajn okulojn, kiuj ĉiam brilas, kaj la plenajn vangojn kun kavetoj. Ŝia mentono estas belforma, kaj ĉar ŝi havas belan nazon, neniu povas diri, ke ŝi ne estas beleta. Ŝiaj haroj tamen faras strangan kon-

traston kun ŝia vizaĝo; fakte ili estas blondaj, sed ĉar ŝi tro ofte purigas ilin per akvo, ili iom post iom perdis la naturan koloron.

Rika neniam pensas pri tio, ĉu ŝi estas bela aŭ malbela, ĉar tio al ŝi estas tute indiferenta. Kviete ŝi iras jam dum jaroj sian kutiman vojon, kaj kviete ŝi iros ĝin plue tiel longe kiel ŝi estos tia sama laborema mutulino, kia ŝin konas ĉiuj vilaĝanoj.

El la III-a parto, 1-a ĉapitro.

La doktoro sidis en la laborejo kaj estis skribanta leteron. Pro la dikeco de sia ventro li sidis sur angulo de la seĝo. Spiregante (li ĉiam spiregis, kiam li devis klini sin) li skribadis kun lipoj premitaj unu sur la alia, kiel de laboristo, kiu kun peno kaj per streĉitaj fortoj faras malfacilan laboron. La pinto de lia lango tamen faris al si la vojon inter ili kaj montriĝis kiel malgranda peceto da sangruĝa viando, kiu sin movis de unu buŝangulo ĝis la alia laŭ tio, ke la plumo faris la movadon de maldekstra al dekstra flanko de la letero. La langopinto tiamaniere ĉiam montris, kie sin trovas la plumo sur la papero, kaj la plumo sen eraro ĉiam diris, kie estas la langopinto.

La doktoro skribis, la plumo marŝetis sur la letero, kaj la langopinto sin ŝovis inter la premitaj lipoj de la skribanto, kaj jam multfoje tiuj du samvojaĝantoj tra iris la saman vojon de maldekstre dekstren. Pacientoj ne estis venintaj, kaj la doktoro uzis la okazon por sia korespondado. Li ĵus finis paĝon, metis la plumon sur la tablon flanke de la letero, kaj samtempe la langopinto retiriĝis. La doktoro eligis longan sopiron, rektiĝis sur la seĝo, tiris la naztukon el la poŝo kaj forviŝis la ŝviton de la frunto, ĉar li ŝvitis pro streĉeco.

El la V-a parto, 4-a ĉapitro.

Moseo ekludis. Kian impreson do povas fari bela muziko al preskaŭ ĉiuj homoj, eĉ al frenezuloj! La krioj el la apuda salonego, kiuj ĝis tiu momento seninterrompe penetris el la plej multaj apartamentoj de la frenezulejo, iom post iom ĉesis. Estis, kvazaŭ la konstruaĵo subite

fariĝis senhoma; oni aŭdis nur la ravajn triladojn de la violonĉelo. Kian efikon la „Kol-Nidrej“ faris al la flegato sidanta ĉe la pordo de la oficejo, ni ne povis vidi, sed mi estis tiel scivola, ke mi jam ne povis regi min. Mi eltiris la oran pinglon el la kravato de mia taga ĉemizo kaj faris trueton en la ŝirmilo, sufiĉe grandan por vidi ĉion, kio okazis ĉe la alia flanko. Mi rigardis tra ĝi. Jen ĉe la pordo sidis griziĝinta viro kun longaj bukaj haroj kaj lipharoj. Li sidis senmove kaj rigardis la ŝirmilon. Komence liaj trajtoj ŝajnis kvazaŭ skulptitaj el marmoro, ĉar eĉ la plej malgranda ŝanĝo ne estis rimarkebla sur ili. Iom post iom tamen la buŝo malfermiĝis, la dikaj grizaj brovoj tiriĝis supren kvazaŭ de surprizo, kaj la manoj de la viro konvulsie premis la apogilojn de la seĝo; ŝajnis, ke li estas tuj salte leviĝonta. Li tamen ne leviĝis, sed aŭskultadis la muzikon. Dume Moseo ludis kaj ludis, ravante ĉiujn per sia instrumento..... Jen subite la grizulo palpis al si la fronton, liaj trajtoj ŝanĝiĝis pli kaj pli, lia tuta eksterajo montris klare, ke io eksterordinara kaptis lian animon, Lia vizaĝo diris: Mi ekmemoras tion.... mi ekmemoras tion!

El la V-a parto, 7-a ĉapitro.

La vetero estis belega. La brilanta suno staris alte sur la ĉielo, kaj kiam ni alvenis sur la dunoj, la kvieta maro sin etendis antaŭ niaj piedoj kiel arĝenta spegulo, ĉar ne unu sulkeo sin movetis sur la supraĵo. La bela vidaĵo ravis nin, kaj ni eksidis momenton sur la sablo por rigardi kaj admiri ĝin. Post kelka tempo ni ekpromenis laŭlonge de la tuta marbordo, de unu domo al alia, fortimigante aretojn da marbirdoj. Laŭte blekante ili flugis ĉirkaŭ ni, eble timante, ke ni forprenos iliajn ovojn; sed kvankam mi montris kelkajn nestojn, ni ne elprenis la ovojn.

Ni venis al la suda flanko de la Insulo, kie kuŝis la ŝlimaĵo, trairis tra ĝi kaj refoje alvenis ĉe la dunoj.

Kvankam la laciĝo nin ekprenis (ĉar ni ne kutimis marŝi alten kaj malalten sur la mola sablo) ni suriris denove la unuan dunon kaj eksidis por ripozi.

Nur unu ŝipo, velŝipo kun du mastoj, estis videbla sur la maro. Ĝi venis el la okcidento kaj sin direktis al la Insulo. Ĝi estis simila al blanka cigno kaj alproksimiĝis majeste sed malrapide, ĉar la vento estis malforta.

Ni rigardis la ŝipon momenton, kaj Johano ekstaris.

Per la mano li ŝirmis al si la okulojn kontraŭ la suno por pli oportune rigardi la ŝipon; tiam stranga, melankolia esprimo, kiun mi preskaŭ neniam vidis ĉe li, glitis sur lia vizaĝo. Ankoraŭ momenton li atente ekzamenis la velojn, tiam li diris kvazaŭ al si mem:

— La Fantazio.

Mi ne komprenis la veran signifon de tiuj vortoj, ne povante imagi, ke la alproksimiĝanta velŝipo portas tiun nomon, ĉar nenies okulo, eĉ ne la lia, povus distingi je tiu granda distanco, kiu nomo staras sur la antaŭkilo de la ŝipo.

— Ĉu vi rekonas ĉi tiun dunon? — mi demandis al Johano.

— Jes, ĉi tie mi alvenis al vi kiel nudulo ... antaŭ dek-du jaroj — li respondis.

Ni eksilentis momenton, rigardante la ŝipon; tiam li diris plue:

— Estas tempo de veno, kaj estas ankaŭ tempo de foriro; tiel volas la sorto, kaj neniu povas ŝanĝi tion ... Kelkfoje la momento de foriro estas malagrabla kaj malĝojiga, sed ni devas nin submeti.

Mi ne komprenis, kion liaj vortoj signifas; ili ŝajnis al mi tre strangaj; post momento li diris plue:

— Ĝi alproksimiĝas pli kaj pli —, kaj li etendis la manon al la ŝipo; mi tamen ne vidis ĝin plu, ĉar maldensa nebulo ekĉirkaŭis nin subite. Ŝajnis tamen al mi, ke Johano ĝin vidas ankoraŭ, ĉar liaj rigardoj restis fiksitaj sur la sama loko.

Stranga timo, mi ne sciis pro kio, subite ekregis min. Mi rigardis Johanon; li staris kiel giganta statuo super mi. Liajn trajtojn mi ne povis plu distingi pro la plidensiĝanta nebulo. Apenaŭ mi povis distingi miajn krurojn, tuj poste mi distingis plu nenion. Kiam mi rigardis refoje supren al Johano, li estis malaperinta, kvankam

tuj antaŭe li staris apud mi, eĉ tiel proksime, ke mi estus povinta tuŝi liajn krurojn. Mi pensis, ke li estas farinta kelkajn paŝojn malsupren en la direkto de la maro.

— Kien vi iras? — mi demandis, sed ne ricevis respondon; mi aŭdis nur brueton kvazaŭ de io falanta sur la sablon antaŭ mi. Du ... tri ... kvarfoje mi aŭdis tiun saman bruon, sed pro la densa nebulo mi nenion distingis.

Mi rampis antaŭen kaj trovis vestojn. Mi rigardis ilin atente ... ili estis la vestoj de Johano. Mi ekmiris kaj ektimiĝis.

— Johano!! — mi ekkriis, sed ne ricevante respondon, mi vokis al mi la aliajn. Ni atendis, esperante ke li revenos aŭ respondos, sed vane. Fine la nebulo supreniĝis, ne iom post iom kiel ĝi estis veninta, sed subite, kaj jen antaŭ ni, je kelkaj paŝoj da distanco, ni lin ekvidis. Ĝis la brusto li staris en la akvo kvazaŭ por sin bani, sed li tute ne intencis bani sin. Serioze kaj gravmiene li rigardis nin; tiam li donis al ni signon per la mano, kvazaŭ por peti nian atenton, kaj ekparolis:

— Miaj amikoj, aŭskultu min dum kelkaj momentoj; mi havas ion por diri al vi ĉiuj. Sciu do, ke la tempo de mia foriro alvenas. Mi ne povas restadi tie ĉi pli longe. Fakte mi ja tute ne apartenas al la homaro, kaj tial mi ne havas la rajton vivi inter la homoj ... Kiam mi alvenis sur ĉi tiun Insulon antaŭ dek-du jaroj, tiam mi venis por ordigi tion, kion la sorto estis malordiginta, ĉar ordinara homo ne povus tion fari. Mi vivis inter la homoj sub multaj strangaj cirkonstancoj. Mi estis jen riĉa, jen malriĉa, sed ĉiam feliĉa kaj kontenta, ĉiam agante laŭ cirkonstancoj. Mi estis kelnero, maristo, flegisto de frenezuloj, purigisto de kamentuboj, aktoro, promenanta propagandilo, kaj eĉ resanigisto. Kiam mi estis riĉa, mi fordonis mian monon por helpi al malfeliĉuloj, kaj mi faris bonon al ĉiu, kiu ajn bezonis tion. Tia homo ne povas ekzisti en realo, kaj li ne ekzistas, ne ekzistis kaj neniam ekzistos; homoj estas nur homoj.

Peto al la Majo.

Majo, Majo, kara Majo,
La plei bela el monatoj!
Kvazaŭ vi juvelo estas
En la rond' de viaj fratoj.

Ĉion, kio nin ĝojigas,
Redonacas vi denove,
Por — post vintra turmentado —
Feliĉigi nin denove:

Bluĉielon, oran sunon,
Mildan blovon de l' aero,
Multkoloran flortapiŝon
Por ornamo de la tero;

Delikatan, verdan veston
Por la tuta kreskaĵaro,
Kiu kovras nian teron
De la montoj ĝis la maro;

Kajsennombrajn kantbirdetojn,
Kiuj himne vin gloradas,
Kies gaja majliedo
Tra la tuta mond' sonadas.

Ĉiujn tiajn belegaĵojn
Ŝutas vi tre malavare
Per la malfermitaj manoj
Sur la teron ĉiujare.

Kaj la tero, post la vintro
Je beleco soifante,
Malfermegas ĉiujn pordojn,
La belecon ensuĉante.

Respiradas siaflanke,
Kion kaŝas ĝi interne:
Gajan vivoĝojon, kiu
Revekiĝas ja eterne.

Kaj la homoj? Ili sentas
La vekiĝon de l' naturo,
Ke de l' Majo forpelita
Estas vintra frostteruro.

Kiel mondon ĉirkaŭprenas
Klara, blua firmamento,
Tiel ligu niajn korojn
La ĉielo de l' konsento!

La beleco enpenetras
Ĝis la fundo de la koroj,
Kaj la belaj sentoj kreskas
Kiel sur la ter' la floroj.

Ĝojo lumas en okuloj,
Ĝojo fluas en la sango,
Kaj per la interna fajro
Ekruĝiĝas lip' kaj vango.

Belaj kantoj gaje sonas
El la ridetanta buŝo,
En la kanto kuntroviĝas
Ĉiuj koroj per ektuŝo.

Sur la korprofundo hele
Brulas la plei bela flamo;
La homaron ĉirkaŭprenas
La potenca, granda amo.

Majo, tian beldonacon
Metas vi en niajn korojn;
Laŭte ili nun sonigas
Tra la mondo viajn glorojn;

Laŭte ili resonoras
Nun por multaj dankesprimoj;
Vin laŭdante unuiĝas
En konsento la animoj.

Kiam venas via tempo,
La homaro gaje festas,
Ĉar en via lumriĉeco
Ni ja feliĉegaj estas! —

Sed ankoraŭ unu peton,
Kara Majo, ho, permesu!
Komencitan bonfaradon
Perfektigi, ho, ne ĉesu!

Kiam ree vi foriros,
La malamon vi forprenu!
Ja forprenu la malamon,
Ke nenlam ĝi revenu!

Kiel ora Majosuno
Brilas super la arbaro,
Tiel sankta amo lumu
Ĉiam super la homaro!

Ĵetu ĝin tre malproksimen
Sur la fundon de la maro,
En la plei malhelajn fendojn
De sovaĝa ŝtonegaro!

Ke ĝi ne plu reaperu
Inter homoj amiĝontaj,
En konstanta bonkonsento
Ili estu vivadontaj!

Pri la belaj arbofloroj
Ĉiuj koroj ekĝojigas,
Sed dum la aŭtuna tempo,
Kiam ili bonfruktiĝas,

Tuj komencas disputado
Inter homoj rikoltantaj:
Pri l' plej belaj el la fruktoj
Ili estas batalantaj.

La konsenton de la koroj
Anstataŭas nun envio,
Kaj la gaja bonsonoro
Iĝas nun disharmonio.

Malamika fajro kaŭzas
Nun la ruĝon sur la vango,
Kaj malamo rapidigas
La fluadon de la sango.

Tial petas mi korege:
Ho, forprenu ĉiujn ecojn,
Kiuj kaŭzas inter homoj
Tiel multajn malbonecojn!

Ho, forprenu la malamon!
Ĵetu ĝin en la inferon
Kaj purigu de veneno
Nian vastan belan teron!

Ke ni povu viajn tagojn
Ĝui en serena ĝojo,
Kvazaŭ bela Majpromeno
Estu nia vivovojo!

Originale verkis *Eduard Jercke*,
blinda sam'deano.